

400–449 paŝoj – 34 baladoj

& Balado por Varsovia Vento:266	& Gaudeamus - Studenta himno:	298
& Fraŭlina kanto:.....267	& Grandula urbeto bruna:	299
& Tro!!:.....268	& La reviviĝo:	300
& Kata logo:	& Ne la amo:	302
& Printempa kanto:.....272	& Demonoj:.....	306
& Stranga nostalgio:	& La drinkej' de Lama Lotte: .	308
& Balado pri l' akuzativo:.....277	& La milito de Pjero:.....	309
& La ursfelo:.....279	& La perfidita junco:.....	311
& Al vi, lingvo mia:.....281	& La soldato kiu marŝas:.....	313
& La vulpo kaj la gruo:	& Al la fratoj:	315
& Malliberulo:	& Majkanto la malnova:.....	317
& Ne turmentu, ho Venus':.....286	& Alvoko:.....	319
& Karinjeto:	& Feina sorto:.....	320
& La ŝipo Albertina:	& Vagemulo:	322
& Esperanta geedziĝo:.....292	& Ekvilibro:.....	324
& La ĉevalo de la angla princo:294	& Svato de monta ogrino:	326
& Letero al amiko eska:		

& Balado por Varsovia Vento:

< Rekante 15 el 25 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<:25> (

/SoSo SoFa MiSo do mi; rere remi redo Ti So;

(#Rekantaĵe: SoSo SoFa MiRe MiSo do; rere redo TiLa So; SoSo SoFa MiRe MiSo do o)

)×)+

(&Strofoj:

'1 /Varsovia Vento sonas, ;
rete ĝin la mondo konas.

(×: **Varsovia Vento bla bla
bla ; donas bonan senton ja ;
Varsovia Vento bla bla bla.**)

'2 Irek en ĝardeno ĝuas ;
gravan homon intervjuas.

'3 Havas bonan mikrofonon, ;
kostis ĝi malmultan monon.
.....

'4 Irek iras al kongresoj ; kaj
plenumas laŭ promesoj.

'5 Programerojn li redaktas ;
kiuj Esperanton traktas.

'6 Venas eksterlanda gasto ;
rompas kranon sen prokrasto.
.....

'7 De radio redakto2r' ; al
fremduj' vojaĝas fo2r.

'8 Helpas Aguŝ intervjui ; kaj
malhelpas homojn brui.

'9 Ruĝa jam sufiĉe sperta ;
intervjue estas lerta.

'10 Varbas Marta sen riproĉo.
; Venkas ŝia bela voĉo.

'11 Tomek familion pasis ; sed
ne la radion lasis.

'12 Du jam edziniĝis brile ; en
Francujo kaj Brazile.

'13 Kunlaboris tridek poloj ;
pri elsendoj kaj paroloj.

'14 Jam eĉ pli ol cent elsendoj
; aŭskulteblas kvazaŭ bendoj.
.....

'15 Pri esperantistoj famoj ;
disvastiĝas per programoj.

'16 Scioj al la tuta mondo ;
venas per la reta ondo.)

& Fraŭlina kanto:

< Ripete 17 el 50 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 3 minutoj. Laŭ hungara popolkanto verkis Ernesto Geleta.>

(#Melodio:

<:50> ((DoDo MiDo SoSo LaSo FaMi Re Do o;)×

(FaSo La La a doTi La So o; do So MiDo SoSo LaSo FaMi Re Do o)×

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Venis al mi Esperanto-
invitilo. ; Mi veturos ĉar mi
estas amkaptilo. (; Ĉarmulino,
facilino, ; Eble mi revenos kiel
junedzino!)×

'2 Mi jam serĉis belan veston
en la ŝranko. ; Certe venos el
la buboj granda kvanto. (; Mia
koro kaj la mamoj, ; Estas ĉiam
preta por la nova amo!)×

'3 Mi la buŝon kaj okulojn
plibeligas. ; Ekvidante virojn
mi jam ĝoje ridas. (;
Ridetante, koramante, ; Tio
estas mia revo ekirante!)×

'4 En la mano por veturo la
bileto. ; Mia cerbo pensas
ĉiam je fileto. (; Bela bubo
estu edzo, ; Kapti ĝojon, jen
estas la grandbleco!)×

'5 Alportis min buso kaj la
vagonaro. ; Al la urba, bela
urba stacihalo. (; Tie estas
renkontiĝo, ; Dolĉa kiso min
atendas je la riĉo!)×

'6 Inter kisoj, la paroloj al mi
sonas. ; Kaj la kisojn al la
bubo mi redonas. (;
Palpebrumas, koro predas, ;
Ĉar mi jam en lia amo tute
kredas!)×

'7 Akompano, amindumo sur
la vojo. ; En la koroj ekloĝiĝis
granda ĝojo. (; Freŝa vento,
amkonsento, ; Ni rapide
proksimiĝas al la venko!)×

'8 Tiel agi en la mondo estus
paco. ; Ni ekvidis la preĝejon
sur la placo. (; Ni kuregu al la
pastro, ; La feliĉon dankas ni
al Esperanto!)×)

& Tro!!:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per similaj melodio kaj rekantaĵo kiel por &"ABC-libro" kaj disduigo na strofoj. Klarigoj (*): '2 Preseraro por ĉu precipe, ĉu principe. '15 Tio estas insulto kompreneble nur laŭ ĉevala vidpunkto! (Rimarko de la aŭtoro).>

(#Melodio:

<1,6:23> (# Tre strömmingar:

/dodo MiFa ReFa MiMi DoMi SoSo; SoSo doTi redo dodo LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do LaSo La a; FaFa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Kie estus fiakristo nekonanta ; Kelkajn vortojn el la lingvo Esperanta?

(×.; **Per Esperanto venas kompren'** ; **Tondre paŝu en la ĉeno jen.**)

'2 Se fremdulojn ekspluati li bezonas, ; Ĉiulingve taŭgajn frazojn li jam konas!

'3 Pelerino, fiakristo, eĉ perfekte ; Nian lingvon ĉiam uzis sendifekte,

'4 Kaj pricipo*, ĉu sur strato, ĉu en stalo, ; Esperanton li parolis al ĉevalo.

'5 Kaj mirinde la ĉevalo lin komprenis, ; Kvankam ofte certa manko iom ĝenis,

'6 Tio estas ĝenerale pri vortkodo ; Instiganta la tirbeston al klopodo,

'7 Efektive ĉe ni mankas, kaj eĉ multaj, ; Sukaj vortoj, akre sakraj kaj insultaj!

'8 Tion spertis, pli ol vir' kun bopatrino, ; Ĉiutage nia brava Pelerino... ..

'9 Iam ree lia besto ne nur ne tre ; rapidetis sed eĉ haltis ĉiumetre

'10 Kaj krom tio ĝi laŭŝajne,
kvazaŭ strike, ; Per la vosto
manifestis plej cinike!

'11 Pelerino kuraĝige kaj
sukere ; jam elĉerpis ĉiujn
gamojn ĝiskolere,

'12 Jam li uzis, pli ordone,
intermikse ; Bruajn vortojn,
aĉ-aldone, fi-prefikse!

'13 Sed la besto des pli lame
nur zigzagis ; Kaj neniom, kaj
neniel ĝi reagis, –

'14 Pelerino aĉe kraĉe plue
duŝis, ; Sed eĉ vorto plej "fi-
akra" ĝin ne tuŝis!

'15 Tiam peke, inspirite de l'
satano, ; Li ekkriis: "Hej, vi
aka... demiano!" (*).....

'16 Kaj jen honte la ĉevalo tuj
ekpalis ; Kaj sub vipo de l'
insulto ĝi mortfalis... ..)

& Kata logo:

< Ripete 50 sed rekante 48 el 67 batoj por strofo, entute 402 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per ŝotisa melodio sveda kaj parte nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:67> (/DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo dodo dodo; DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo TiTi TiTi; SoSo

(#Rekantaĵe: Tire fafa mire; fafa mire so so;)

(#Ripetaĵe: sola somi fare Tire dodo doTi do omi;)

(#Rekantaĵe: so somi domi So; so somi domi So; mi redo mimi redo mire redi re emi; fa fare Tire So; fa fare Tire So; fa mire so mi redo doTi dore do do o)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Se vi pipon vire fumas, ;
Sen intesta embaraso, ; Kaj
soife okulumas ; Al belŝaŭma
bierglaso, (':; Jen vi

(×:; **estas taŭga frato ; De la
Verda Kato!**))

(,;:; Jen vi estas taŭga frato ;
De la Verda Kat'!)

(×:; **2× (Paŝu nun en la
danc'! ;)×2 kaj estu taŭga
frato ; de la Verda Kato!**)

'2 Se vi povas dum diboĉo, ;
Kiel sana filozofo, ; Kanti per
miaŭa voĉo; Ĝis la fina kata
strofo, ; Jen vi

'3 Se vi scias per mokvorto ;
Ŝerci pri respekta moro, ; Se
vi povas ĝis la morto ; Nutri
vin per bonhumoro, ; Jen vi

.....

'4 Sed!! Se peze kun prediko ;
Vi grumbladas primorale ; Kaj
pro konscienc-koliko ;
Manĝas herbojn nur sen salo, ;
Vi ne

'5 Se vi prude kaj sendistre ;
Ŝatas mola sur kanapo ; Ronki
pace kaj filistre ; Kun
pantofloj kaj noktĉapo, ; Vi ne
.....

•
'6 Se anstataŭ eĉ absinton ;
Trinki freŝe el botelo ; Vi
preferas suĉi pinton ; De
malseka pluvombrelo, ; Vi ne
.....)

& Printempa kanto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 406 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Janko Král'. El slovaka tradukis Pavel Rosa (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per melodio kaj rekantaĵo de Petro sinjor' kaj Elinborg'.>

(#Melodio:

<1,6:29>

(/LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi
dodo; doTi doTi LaSo

(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi
doTi La a)

)×14)+

(&Strofoj:

,& Parto unua:

'1 Kantis kanton
fruprintempan vigla kukoleto,
; vokis mondon dormetantan
al nova impeto.

(×: **Nun emas mi e2n dancon
jam iri ; dum rozoj, lilioj
kreskadas tre.**)

'2 Voĉo de la libereco vekas
tutan mondon - ; ĉu ni knaboj
elsub Tatroj ne donu
respondon?

'3 Ĉiujn barojn kaj malhelpojn
rompas fort' mistera ; kaj nin
feblajn ĉu priridu montaro
aŭstera?

'4 Ekmoviĝis Subtatranoj kaj
parencaj gentoj, ; super Slavoj
matenruĝas de libero sentoj.

.....

'5 Ne ekzistas nom' pli bela, ol
la nom' - libero, ; nomon tiun
ne plu baros eĉ mem la infero!

.....

'6 Niaj fratoj are mortis pro la
sankta nomo - ; sed el tombo
releviĝas jam libera homo.

,& Parto dua:

'7 Libereco, bela nomo,
mondo sen vi vivas! ; Fratoj
karaj, ĉie fiaj murdistoj
aktivas:

'8 ili ĉiuj diversflanke ege nin
strangolas ; kaj slovakan
familion neniigi volas.

,& Parto tria:

'9 Venas ŝtormo de danubo,
nuboj tre malhelaj, ; tristaj
vortoj alvenadas pri Slavoj
ribelaj:

'10 sudaj stepoj tristan eĥon al
ni nun konfesis - ; Dio kara,
ĉu entute vi nin jam forgesis?
.....

'11 Unu trompas, dua murdas -
inferanoj ĉiaj, ; kaj la tria
primokadas, ke ni estas fiaj.
.....

,& Parto kvara:

'12 Kantu kanton
fruprintempan vigla kukoleto,
; voku ĉiujn slavajn fortojn al
nova impeto!

'13 Kaj vi, fratos niaj karaj,
monde dissemitaj, ; se vi eĉ
nun ne moviĝos, estu
malbenitaj!

'14 Ligu kune fratajn manojn
al granda impeto - ; novan
kanton kantos al ni nia
kukoleto!)

& Stranga nostalgio:

< Rekante 20 el 29 batoj por strofo, entute 406 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per islandaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

(#: <:29> o;so /soso doososo sola so; mifa so mire do;so soososo soorelmi fami doo;mifa soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do)

)×14)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Sur /vastaj stepoj de Siberi'

(×:; **Se erar', li en star' ;)**

vagadi, eĉ nun, mi 2n vidas mi.

(×:; **Kaj la ruĝa brulis fla2m'. ; Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'.)**

'2 La kant' de l' vintro muĝas nur en ventsiblado kun murmur'... ..

'3 Rakontas ĝi pri larm', sufer', pri detruitaj rev', esper',

'4 pri krimoj de l' militkruel' kaj sangaj tagoj de l' ribel'... ..

'5 Veadas en ĝi: kri' de l' mort', ĉielon blasfemanta vort'

'6 kaj ploras en ĝi kun sopir' infanojn orfiĝanta spir'... ..

'7 Ho Dio, tamen je Siberi', min kial premas la nostalgi'?!

,&2:

'8 En ligna domo de Siberi', ĉe forno sidi, min vidas mi.

.
'9 La griloj ĉirpas en trabar',
..... intime zumas samovar'...

.....

'10 Fabelas ili en silent'
plej belajn songojn de
korsent'.

'11 Nun min kulpigas en
sekret', ke restis tie
knabinet',

'12 ke forlasitaj, jen, anim'
kaj koro, kiuj amas min,

'13 ke restis tie eĉ mi mem
kaj venis hejmen - viva ĝem'...
.....

'14 Pro tio sole je Siberi'
min premas larme la nostalgi'!
.....)

& Balado pri l' akuzativo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 407 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Li renkontis junulinon - ; -
kia ĉarmo, kia belo! - ; en l'
okuloj fajro flamas, ; sur la
brusto verda stelo.

(×: **Kazon li foje forgesas ;
Gramatikon ĉu progresas ;
Tial ŝi forlasas lin ; Kazon li
foje forgesas.**)

'2 "Kie povus vi renkonti ; mi
junul' vi admiranta?" ; li
demandis. Ŝi respondis: ; "En
la klubo Esperanta."

'3 Li do venis en la klubon. ;
Tie li kun ĝojo vidis, ; ke l'
knabino admirata ; inter la
ceteraj sidis.

'4 Li atendis, paciencis; post
kunveni li tuj iris ; diri al ŝi:
"Mi vi amas!" ; Sed ŝi nur la
brovojn tiris:

'5 "Pri amoro mia, knabo, ;
tute vane vi petegas; vanas
amo via, se la ; kvaran kazon
vi ne regas.

'6 Ja vi diris: Mi vi amas. ;
Estas ĝi malbona frazo, ; ĉar
en tiu frazo mankas ; la
gravega kvara kazo!"

'7 La junulo do kuregis ;
gramatikon tuj aĉeti; post
kleriĝo li denove ; pri favor'
ŝin volis peti.

'8 Sed virinoj – eĉ la verdaj! -
; estas bando ja puninda ;
aŭdu ĉiuj, kion spertis ; la
junulo kompatinda:

'9 Li, povrulo, sidas hejme, ;
lernas la akuzativon, ; dum ŝi
kun amikoj siaj ; ĝuas la
agrablan vivon.

'10 Kian el ĉi okazaĵo ; ni
instruon ĉiuj havas? ; Por
sukcesa amindumo ;
lingvokono bona gravas!

'11 Kio estas la instruo ; el ĉi
malgajeta kanto? ; - Ke ne
provu spertulinon ; amindumi
komencanto!

& La ursfelo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 407 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigas Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Konfeso.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Du kompanoj en
drinkdomo ; pri ĉasadoj
fanfaronis, ; ĉe l' apuda tablo
homo ; miris, miris, kaj
proponis:

(×:; **Zorgojn li foje forgesas ;
Li pri felo tro promesas ;
nek la urson venkis li;
Zorgojn li ĝoje forgesas.**)

'2 "Aŭdu, ho ĉasistoj gloraj, ;
urso tra l' arbaro vagas. ;
Dudek kvin monerojn orajn ;
mi por ties felo pagas."

'3 Ĉar la monon tiuj sentis ;
jam tintadi en la poŝo, ; ĉion
bonan ili mendis, ; drinkis ĝis
la lasta groŝo.

'4 Poste ili venko-certe ; iris al
la ĉasekskurso. ; Ili iris, ĝis
averte ; unu kriis: "Jen la
urso!"

'5 Urso, jes, sed ve, giganta, ;
alta super arbotrunkoj, ;
sovaĝege atakanta ; per la
ulno-longaj ungoj.

'6 Terurite, la kompanoj ; ne
kuraĝis lanci, pafi, ; ĵetis ĉion
el la manoj ; kaj klopodis nur
sin savi.

'7 l' unu grimpe sin defendis, ;
rampis sur arbeg' ĝis pinto, ; la
alia sin etendis ; sur la tero,
kaj mortinto

'8 sin ŝajnis (ĉar laŭdire ;
urs' ne manĝas mortan
homon). ; Rigidiĝis li
senspire, ; ne montrante
vivosimptomon.

'9 l' urso venis kaj lin flaris ;
ĉe orelo, nazo, buŝo, ; sed
nenion al li faris: ; Iris for sen
ia tuŝo.

'10 Kuŝis li kun turna kapo ... ;
Nun descendis la kolego, ;
ŝercis, ĝoje pri l' eskapo: ;
"Kion diris la ursego?"

'11 "Ho, ĝi flustris ĉe orelo ;
ion, kion ni ne lernis: ; Tiam
trinku je ursfelo, ; kiam vi la
urson sternis."

& Al vi, lingvo mia:

< Rekante 41 el 82 batoj por strofo, entute 410 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (1911) kun moto "Vi, mia tuta vivo kaj trezoro! (El "Hamleto".)". Baladigis Martin Strid (2016) per kvazaŭ nova melodio kaj rekantaĵo nova.>

(#Melodio:

(/SoSo dodo mimi redo Tido re So; SoTi remi fare soso fare mi do; mido LaLa Lado fafa sofa mi do; Tido rere rere mire Ti So; SoSo dodo mimi redo Tido re So; SoTi remi fare soso miSo re do;

(#Rekantaĵe: So do mi reldo Tido re So; SolTi relmi fa relso fare mi do; mido LaLa Lado fafa sofa mi do; Tido rere rere mire Ti So; So do mi reldo Tido re So; SolTi relmi fa relso fare mi do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Al Vi, lingvo mia, mia Esperanto, ; kiu en la tagoj plenaj jam je prozo ; ravis koron mian, kaj per sun' kaj rozo ; ĝin plenigis ĝis al superfluo, ; al Vi, lingvo mia, mia Esperanto, ; sonu ree mia hodiaŭa kanto.

(×: Paŝ, paŝ, paŝu2 en la ĉeno ; i2nte2r ĉarmo2 kaj ĉagreno ; Per piedoj tondru takton sur la planko ; Al poeto ni dediĉu dankon ; Paŝ, paŝ, paŝu2 en la ĉeno ; i2nte2r ĉarmo2 kaj ĉagreno.)

'2 En malhelaj tagoj, preskaŭ en aŭtuno, ; de la vivo mia la plej bela peco, ; mia longe forgesita infaneco ; sin enŝtelis kun Vi en la koron ; kaj ankoraŭ unufoje en aŭtuno ; ekridetis je mi ree varma suno.

'3 Ĉarmaj virinetoj de l' profunda maro, ; Karol Moor kaj Hamlet, stranga princo dana, ; granda Guliver' kun gento filigrana, ; cikonio kun infan' en beko; preskaŭ ĉiujn mirojn de la ter' kaj maro ; mi ekvidas per Vi, belajn en komparo.

'4 De la vivo mia forgesita
paĝo ; malfermiĝas per Vi,
lingvo mia kara, ; kaj en vivo
mia nuna, ordinara, ; Vi
permesis al mi, lingvo mia, ;
legi ree ion sur malnova paĝo
; pli pli belaj jaroj, mia juna
aĝo.

'5 Se mi estas iam al Vi malpli
varma, ; pro la efemera bildo
de l' juneco, ; pro malgranda
de l' feliĉo peco, ; kiu per Vi
al mi ekaperis, ; ĉiam por Vi
bato mia koro varma, ; por
Vi, lingvo mia, lingvo mia
ĉarma.)

& La vulpo kaj la gruo:

< Rekante 9 el 17 aŭ 18 el 31 batoj por strofo, entute 170 paŝoj dum 2 minutoj aŭ 410 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por Ora Koko kaj alia rekantaĵo. Alternative eblas uzi melodion kaj rekantaĵon de Sigmunda balado.>

(#Melodioj:

((# Ora Koko: <:17> /dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo; (#Rekantaĵe: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)) ?

(#Sigmunda balado: <:41> /mi mi ldolre mi mi mido re fa; mimi mimi mido re fa; (#Rekantaĵe: mire do; domi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; Somi mimi re do))

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Vulp' invitis al si grupon ;
kaj al ĝi promesis ĝuon

(×:;

(# Unua: (×:; **Gaje dancu en la rond' ; kaj ni kantu pri bestara mond'.**)?)

(# Alternativa: **En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 manĝi, trinki plej agrable. ;
Tiu venis. Nu, surtable

'3 estis supoj delikataj, ; sed
nur en teleroj plataj.

'4 Dum la vulpo do festenis, ;
ĝia gasto vane penis

'5 per la longa, pinta beko ; pri
elsuĉo aŭ elleko.

'6 Tio la grupon tre incitis, ; ĝi
la vulpon reinvitis;

'7 faris kuiradon grandan, ;
ĉion bonan, pleje frandan

'8 donis, sed, kun venĝo-volo,
; en botel' de longa kolo.

'9 Sian bekon ĝi enŝovis, ; sed
la vulpo vane provis

'10 manĝi el la svelta vazo, ;
iris for kun longa nazo.)

& Malliberulo:

< Rekante 29 el 59 batoj por strofo, entute 413 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Dektria numero.>

(#Melodio:

<:59> (

/mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ne besto sovaĝa, fermita en kaĝo, ; De ĉeno fortika sin ŝiras, ; Ne gaja birdeto, kaptita per reto, ; Pri freŝa aero sopiras, -

(×: **Vidu, suno levas nun sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.**)

'2 De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras ; Junulo tre bela, tre brava! ; Predikas li veron, justecon, liberon, ; Kaj pensis, ke estas li prava.

'3 Revanto ne vidis, ke ĉiuj nur ridis ; Je lia parolo sovaĝa: ; Sin amo inspiris, sed ĉiuj rediris, ; Ke estas li homo malsaĝa!

'4 Li multe suferis, li multe esperis, ; Li kredis, ke venos libero, - ; Kaj ree kun flamo predikis pri amo, ; Pri paco tutmonda, pri vero.

'5 Ho, kia eraro! Neniam homaro ; resonos al voko predika: ; Homaro - prudenta, kaj estas sensenta ; Al voko malforta amika!

'6 Sed li ne silentis: li pensis,
li sentis, ; Ke homoj lin fine
komprenos, ; Ke liaj amikoj al
liaj predikoj ; De ĉie kun ĝojo
alvenos.

'7 Kaj jen rezultato: li en
kazemato ; En ŝarĝaj katenoj
nun sidas, ; De ĉeno sin ŝiras,
senfine sopiras, ; Kaj vane
liberon avidas. –)

& Ne turmentu, ho Venus':

< Rekante 30 el 59 batoj por strofo, entute 413 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis El slovakaj tradukis Eduard V. Tvarožek (Slovakaj antologio, 1977). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:59> (

/soso sofa mi mimi; fafa fare mimi; soso sofa mimi mi; fafa fare mimi; mimi mifa; soso somi; fa fare mimi; mi mifa soso; fafa fafa mi rere mimi;

(#Rekantaĵe: soso sofa mimi; fa fare mi mi; soso sofa mimi; fa falre mi mi; mimi mifa; soososo somi; fafa fare mi; mi mifa soso; fafa fafa mi re do o))×7)+

(&Strofoj:

'1 Ne turmentu, ho Venus ;
false koron mian, ; ne toleros
ĝi ja plu ; la falsaĵojn viajn; vi
vundbatas, ; ne kuracas, ; vi l'
koron prenas, ; vian ne donas,
; min turmentas, vin ne
permesas.

(×: **Gvidu min la ĉeno ; kien
mi venu. ; Tenu mian manon
; sen ĉa2greno ; nin
renkonte ; vikle volonte ; per
piedoj plu. ; Zorgojn
estingu, ; manojn svingu,
danca ĝu'!**)

'2 Ho, karulin', kial vi ; min
turmenti ŝatas? ; Mi malsanas,
– scias vi, ; sed min ne
kompatas; vi vundbatas, ; ne
kuracas, ; vi l' koron prenas, ;
vian ne donas, ; min
turmentas, vin ne permesas.

.....

'3 Mian amon neniam, ;
karulin', perfidu, ; por ke l'
koron mian vi ; velki for ne
vidu; do malkaŝu, ; vidi lasu, ;
ĉu vi trompas ; aŭ ĉu amas, ;
pensu, kiun vi en koro havas.

.....

'4 Se aliun amas vi, ; min vi ne
turmentu, ; se lin preni volas
vi, ; tion ne silentu – ; vidas
mi ja, ; ke kor' via ; ribelas
ĉiam; komencas mi jam ; tre
bedaŭri amon al vi mian.

'5 Malfeliĉa mia am'! ;
Trompa konsolado, ; ĉar
ŝanĝiĝis tute jam ; nia jen
amado! ; Vi min trompis, ;
koron rompis, ; poste subite, ;
neatendite ; gajecon mian vi
prenis tute.

'6 De kie mi malgaja ; povus
helpon voki? ; Mian amon al
vi ja ; ne eblas sufoki. ; Mia
koro ; en karcero ; vane
suferas, ; jam ne esperas, ; ke
l' amo trompon venki superas.

.....

'7 Restu kun la falsa kor' ; al
kiu vi volas, ; mi ja vidas, ke
vi ne ; mia esti povas. ; Mi
suferas, ; ne esperas; aliun
havas ; vi kaj lin amas. ; Se
ne, memoru, ke mi vin amas.
.....)

& Karinjeto:

< Ripete 16 el 32 batoj por strofo, entute 416 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4418. El sveda tradukis Kukoletto (-LOrE).>

(#Melodio:

<:2> (

(imi /LaTi domi /milre domi /somi fare /mi)×

(imi /somi fare /mildo LaTi /domi milreTildo /La ah)×

)×13)+

(&Strofoj:

'1 (Kaj /Karinjeto /se2rvis en /re2ĝa ka/stel'.)× (/Inter servi/sti2noj ŝi /brilis ki2e2l /stel'.)×

'2 (/Inter servi/sti2noj ŝi /brilis kiel /stel'.)× (Kaj /juna reĝo /Karinjeton /alparo2lis ti/ele:)×

'3 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Ĉevalon grizan kaj orselon donos mi2 a2l vi.)×

'4 (Ĉevalo griza kaj orselo estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'5 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Plej ruĝan oran kronon mian donos mi2 a2l vi.)×

'6 (Plej ruĝa ora krono via estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'7 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Duonan reĝan regnon mian donos mi2 a2l vi.)×

'8 (Duona reĝa regno via estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'9 (Aŭskultu, Karinje2to, se vi rifuzas min,)× (en najlan la bare2lon metigos mi2 ja2 vin.)×

'10 (Kaj se en najlan la barelon vi metigos min,)× (anĝeloj diaj vi2dos ke mi ne ku2lpa2s ĝin.)×

'11 (En najlan la barelon enmetis ili ŝin.)× (Kaj reĝaj servaj kna2boj ĉirkaŭen tu2rni2s ĝin.)×

'12 (Kolomboj blankaj ve2nis de la ĉielo du,)× (prenante Karinje2ton kaj tri fari2ĝi2s tuj.)×

'13 (Kaj korvoj nigraj ve2nis de la infero du,)× (prenante junan re2ĝon kaj tri fari2ĝi2s tuj.)×)

& La ŝipo Albertina:

< Ripete 18 sed rekante 8 el 32 batoj por strofo, entute 416 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4460. Marista tirkanto skandinava. El sveda tradukis Kukoleto (1993 LORE).>

(#Melodio:

< 1,8:4> (

So /mi rere dodo rere /do o Ti; rere /relre LaaTi dodo TiLa /So;
sooso so; SoTi /rere rere TiSo; dore /mimi soso mido; remi /falfa
LaaLa SoSo Tire /do; doodo do

)×13)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝip' konstruiĝis en la
/Nordo ; Alber/tina ja estis ĝia
/nom' ; Pumpu for! ;
Alber/tina, estu vere ;
Alber/tina, sendanĝere ;
Alber/tina ja estis ĝia /nom' ;
Pumpu for!

'2 Kaj la ŝipo ja estas jam
rigita ; (: jam rigita per jardoj
kaj mastar')

(×:; **Pumpu for!**)

(,: Jam rigita,)

(×: **estu vere** ;)

(,: jam rigita,)

(×: **sendanĝere** ;)

(,: jam rigita per jardoj kaj
mastar' ;)

(×: **Pumpu for!**)

'3 Kaj ta ŝipo jam estas
kolorita ; kolorita per ruĝo kaj
viol'

'4 Tiu ŝipo ja estas jam lanĉita
; jam lanĉita per pompo kaj
ĉampan'

'5 Kaj la ŝipo ja estas jam
ŝarĝita ; jam ŝarĝita per
brando kaj bier'

'7 Al Madejro nun havos ni
direkton, al Madejro l' direkto
estos do

'8 Kaj ploras knabino sur la
strando ; jes, ŝi ploras pro l'
amiko sur la mar'

'9 Tiu ŝipo jam fine
surgrundiĝis ; surgrundiĝis
inter ŝeroj kaj ondromp'

'10 Kaj la ŝipo jam estas
elrabita ; elrabita inter ŝeroj
kaj ondromp'

'11 Ĝia tombo jam estas fosita
; jam fosita inter ŝeroj kaj
rokar'

'12 Epitaf' ĝia estas jam
skribita ; jam skribita en oro
en latin'

'13 Tie ploras knabino en la
Nordo ; kaj ŝi ploras pro
malesta marist'

& Esperanta geedziĝo:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 418 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (

/So dodo doSo LaLa LaMi; FaFa SoSo SoRe Mi Mi;So dodo doSo LaLa LaMi; FaFa SoSo SoTI Do Do

)×22)+

(&Strofoj:

'1 /Aperis pri-edziĝa peto ; De junulo en gazeto,...

(×:: **Ho, estu vi amiko mia ; restu kun mi en la ĉeno!**)

'2 Responde skribis junulino ; Pri samtema korinklino, –

'3 Kaj baldaŭ ili, laŭ promeso, ; Renkontiĝis ĉe l' kongreso. –

'4 Ĉar ili plaĉis reciproke, ; Geedziĝis tuj, samloke. –

'5 Ĝi estis grandioza festo ; Pro multnombra homĉeesto! –

'6 Ne multaj ĉe la pastra beno, ; Sed – multegaj ĉe l' festeno! –

'7 Kaj la kongressekretario ; Zorgis pri l' ceremonio: –

'8 Soifa Lingv'-Komitatano ; Trinkis je l' geedza sano; –

'9 Kasisto perdis sian kason ; Dum li malplenigis glason; –

'10 Kaj oni aŭdis Prezidanton ; Kanti tre petolan kanton; –

'11 Mallerta Akademiano ; Rompis glason da ĉampano:

'12 Vegetarano pro sufoko ; Glutis oston de la koko; –

'13 Kaj ĉastemulo kun plezuro ; Pinĉis en virina kruro; –

'14 Abstinenculo, ve, sen danko, ; Multe vomis sur la planko; –

'15 Entute ĉiuj festaranĝon ;
Longe laŭdis kaj la manĝon...
.....

'16 La nova paro ĝojpetola ;
Tre deziris... esti sola, –

'17 Al ĉiuj do adiaŭdiris, ; Kaj
diskrete ili iris, –

'18 De U. E. A. la delegito ;
Gvidis ilin ĝis la lito, –

'19 Kaj tiam li, – pro bona
ordo, – ; Gardostaris ĉe la
pordo; –

'20 Rigardis li, pro malenuo, ;
Iom tra l' serura truo, –

'21 Kaj poste sendis li, laŭ
devo, ; La raporton al
Ĝenevo*, –

'22 Ni legos eble pri detaloj ;
en Jarlibro aŭ ĵurnaloj... ..)

& La ĉevalo de la angla princo:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 420 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino". Klarigo (*): '10 Elparolu "kaŭbojz" (bovinbuboj), karesnomo malestimeta pri usonanoj.>

(#Melodio:

<:35 > (

/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido reTi;
rere doTi Lado La

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa
doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Denun estas interesaj ; La gazetoj, dank' al Di', ; Ne plu temas pri promesoj ; De la Pac-Delegaci',

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Nek pri krimo kontraŭmora ; En vilaĝo de provinc', ; Sed nun temas ĉiuhore ; Ĉiam pri la angla princ'!

'3 Ni ekscias tre detale, ; Ke la princ' kun appetit' ; Trinkis kafon sinregale ; Frumatene en la lit',

'4 Kaj plej zorge oni pesis ; Lin post sveda gimnastik', ; Kaj lin multe interesis ; Lia princa umbilik'!

'5 Dum li poste, tre prudente, ; Rajdis al kastela fest' ; Li bonvolis akcidente ; Fali de l' ĉevala best',

'6 Jes, – sed malgraŭ la
doloroj, ; Kiujn kaŭzis tiu fal',
; Li heroe multajn horojn ;
Rondodancis ĉe la bal'.

'7 Por kompensi lian penon ;
Oni donis tuj al li ; Kelkajn
kukojn kaj... ordenon ; Laŭ
kortega tradici';

'8 Kaj la princo tre ĝentile
Ĝojis pri la or-medal' ; Kaj
dankeme li plej brile ; ... Ree
falas de l' ĉeval'!

'9 Kaj nun, laŭ gazet-aserto, ;
Oni varme gloras lin, ; Ĉar li
estas tiel lerta, ; Ke li eĉ ne
vundis sin!

'10 Ĝus la princo mem ordonis
; Festojn tra la tuta land', ; Ĉar
la famaj "Cow-boys*" nomis ;
Lin honora Prezidant'!

'11 Kaj gazeto plej fiere ;
Skribas nun kun kompliment',
; Ke la princ' de post hieraŭ ;
Rajdas jam sen akcident'.

'12 "Firme" ĝi al ni konfidas ;
"Li sin tenas sur la sel'..." ; ???
Certe, certe, – ĉar li sidas ; Sur
ĉeval' de karusel!

& Letero al amiko eska:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 426 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, 1912) kun vorto "Reminiscenco pri Krakow". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Recepto por fari bonajn versaĵojn. Klarigoj (*): '2 Plantacioj estas parko sur la loko de iamaj muroj kaj remparoj, kiuj ĉirkaŭadis en mezepoko la urbon Krakow. ; Łódź, elparolu Ŭudĵ, pola urbo.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi ldo; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi ldo;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TilLa Ti dolTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Fine mi ĝin trovis, kanton mian belan, ; kanton kiun vane serĉis mi en ko2r'. ; Ĝi infano estas mia efektiva, ; part' de koro mia, varma, juna, viva, ; sur herbej' aŭtuna elkreskinta flo2r'.

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Ho, mi ĝin rekonas, mi eĉ horon scias, ; kiu sonis tiam nokte sur horloĝ'; sur benketo sidis ni en Plantacio* ; kaj kun kor' krevanta kajkun emocio ; pri hejm' via ni parolis, via Łódź*.

'3 Homoj preteriris, noktaj geamantoj, ; brako ĉe la brako, koro ĉe la kor'; en iliaj vejnoj ruĝa sango bolis, ; siajn esperetojn ĉiuj priparolis - ; ho, benata estu, vi, meznokta hor'!

'4 Tiam koron mian mi al vi
malfermis, ; kiel se vi estus
mia amatin', ; kaj dum ni
parolis unu kun alia ; nova
kant' ekĝermis en interno mia,
; sedsurvoje hejmen mi, ho, - -
perdis ĝin.

'5 Tage, nokte, mi ĝin serĉis,
tamen vane, ; ĉiuj ĝiaj
postesignoj estis for. ; Eble,
pensis mi, ĝin vento
superŝutis, ; eble ĝin por ĉiam
terintern' englutis, ; mi ĝin de
tiama ne ekvidis hor'.

'6 Kia stranga vere estas ĝi
hazardo, ; ke ĵus vi ĝin trovis
ie sur la voj'! ; Kvankam vi
alian al ĝi formon donis, ;
tamen mi la kanton mian tuj
rekonis - ; dankon al vi pro
farita al mi ĝoj'.)

& Gaudeamus - Studenta himno:

< Ripete 18 el 61 batoj por strofo, entute 427 paŝoj dum 3 minutoj. El latina tradukis L. Zamenhof. La kutima latina titolo estas “Gaudeamus igitur”. >

(#Melodio:

(
(/do3So So do /La3La La La /Ti3do re Ti /dolmi do o)×
(/Ti3do re re /mi3do re re)×
/doTi Lalfa milre /mi lre ddo /doTi Lalfa milre /so lTi ddo h
)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Ĝoju, ĝoju /ni, kolegoj,
/dum ni junaj /e2stas! /Ĝoju,
ĝoju /ni, kolegoj, /dum ni
junaj /e2stas! /Post plezura
/estanteco, /post malgaja
/maljuneco /Sole te2ro2
/re2stos, /sole te2ro2 /re2stos.

'2 (Vivo estas tre mallonga,
kuras ne tenate.)× Kaj subite
morto venos, kaj rapide ĉiun
prenos, (Ĉiun senkompate.)×

'3 (Kie niaj antaŭuloj en la
mondo sidas?)× Iru al la
superuloj, serĉu ilin ĉe
subuloj, (Kiu ilin vidas?)×

'4 (Vivu la Akademio, kaj la
profesoroj!)× Vivu longe, kaj
en sano, ĉiu akademiano,
(Vivu sen doloroj.)×

'5 (Vivu ĉiuj la knabinoj belaj
kaj hontemaj!)× Vivu ankaŭ la
virinoj, amikinoj kaj
mastrinoj, (Bonaj
laboremaj.)×

'6 (Vivu, floru nia regno kaj
regnestro nia)× Kaj amikoj
mecenataj, protektantoj
estimataj (De l' akademio.)×

'7 (Mortu, mortu, malgajeco,
mortu la doloro!)× Mortu ĉiu
intriganto, kaj malamon
konservanto (Longe en la
koro.)×)

& Grandula urbeto bruna:

< Ripete 30 el 61 batoj por strofo, entute 427 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis kaj komponis Zeca Afonso. El portugala tradukis La originalo, “Grândola, Vila Morena” (albumo Cantigas do maio, 1971), estis unu el du kantoj uzataj kiel sekretaj signaloj en publika radio por alvoki kaj konfirmi la ekon de kontraŭdiktatura ŝtatrenverso kaj sensanga revolucio en Portugalujo en jaro 1974-a.>

(#Melodio:

<:61> (

h /Do3Do Do oTI DoRe Mi lRelMilRe Do o; Fa3Fa Fa aMi FaSo
La lSolLalSo Fa a; Fa3Mi Fa3So LaSo Fa lMilFalMi Re e; TI3Do
Re3Fa Mi3Re Mi lRelMilRe Do o;; So3So So odo SoFa So
lFalSolFa Mi i; La3La La aSo LaTi do lTildoITi La a; La3So
La3Ti do3Ti La lSolLalSo Fa a; Re3Mi Fa3La SoFa (So
lFalSolFa Mi i)?(Mi lRelMilRe Do o)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 (: /Grandula, urbeto bru4na
; Vera hejmo de frata4ro ; En
vi regas vol' komu4na ; En vi
estas solida4ro)

(,: En vi estas solida4ro ; en vi
regas vol' komu4na ; Vera
hejmo de frata4ro ; Grandula,
urbeto bru4na)

'2 En vi havas mi amikon ;
Temas pri la proletaro ;
Grandula, urbeto bruna ; En vi
estas solidaro

'3 Vera hejmo de frataro ;
Grandula, urbeto bruna ; Inter
via proletaro ; Plene regas vol'
komuna

'4 En la ombro de ĉi kverko ;
Kiu aĝas sen komparo ; Ĵuras
sekvi mi ĝis ĉerko ; Grandula,
de vi leĝaron

'5 Grandula, de vi leĝaron ;
Ĵuras sekvi mi ĝis ĉerko ; En
la ombro de ĉi kverko ; Kiu
aĝas sen komparo

& La reviviĝo:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 430 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Per espero al despero, Pardubice 1910). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Unua koncerto.>

(#Melodio:

(/MiMi MiFa FaMi MiLa Lado; mimi mifa fami mido doTi;
MiMi MiFa FaMi MiSi SiTi; rere refa fami mido Ti La;

(#Rekantaĵe: Mi MiFa FaMi MiLa Lado; mi mifa fami mido
doTi; Mi MiFa FaMi MiSi SiTi; re refa fami mido Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Mi jam estis sen la idealoj,
; ne ekzistis por mi jam la
floro, ; eksekiĝis amo en la
koro, ; min ne tuŝis kant' de
najtingaloj.

(×: **Memoru kion kanto
diras ; dum vi en danco paŝe
spiras. ; Metu la vorton en
memoron ; kaj ĝin akceptu
en la koron.**)

'2 Mi nur vidis rapidantan
sorton, ; nokton seneliro kaj
sen fino, ; la fantomon, kun la
kurba spino - ; insideme
proksimantan morton.

'3 Mi ne ploris, mi ne ĝojis
plue, ; mi nur kantis unu
melodion, ; ke la sorto
tiunkomedion ; kun mi finu,
kiel eble frue.

'4 Sed subite, kiel el la dormo
; mi vekiĝis tute elŝanĝita ; kaj
la mondo demi forlasita ;
aperis al mi en nova formo!
.....

'5 Granda suno brilis sur
lazuro; kaj vastiĝis ĉie lum'
kaj varmo ; kaj en branĉoj
kant' de l' birda svarmo ; sonis
kiel ia uverturo.

'6 Tuj mi sentis, kiel stranga flamo ; disverŝiĝas en la pala vango ; kaj en mia koro densa sango ; brulis kiel iam dum la amo.

'7 Odorplena spiris la aero ; kaj el ĉiu plej kaŝita niĉo ; ekridetis al mi la feliĉo, ; nova vivo, plena je espero.

'8 Dankon al vi, stranga verda stelo, ; kiu en la nokto sen espero ; el putranta, ŝima atmosfero ; ekaperis hele sur ĉielo.

'9 Dankon al vi, kiu en krepusko ; ekbriletris al mi, foriranto, ; kiel precioza diamanto, ; kiel luma muŝo en la musko.

'10 Nur mi tremas, ke la juna floro ; ne sekiĝu al mi en la mano ; kaj ne dronu en la oceano ; mia stelo, kiel meteoro.)

& Larmoj de Kristo:

< Rekante 25 el 43 batoj por strofo, entute 430 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Bonfara Influo de la Alkoholo.>

(#Melodio:

<:43> (o;So /doododo dodo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa redo
TiLa So o;So doododo dodo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa redo
TiLa So o;h

(#Rekantaĵe: miimimi mire dooTiTi do; reerere reedodo TiLa Ti;
doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doododo TiiTiTi do;
doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doodore miirere do;
)×10)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Sur /sangsaturita kamp' de
batalo, ; tra vea nebul' de l'
lasta ĝem' ; al orfe mortantaj
homoj en valo ; aperis konsol':
la Kristo mem. ;

(×:; **Kantu fiere, kantu en
ĉen! ; Paŝu surtere, ĝin
draŝu jen! (; Kune en rondo
ne zorgu pri mondo, tondru
la ĝojo en danca la hal'!)**×2)

'2 Li venis kun pomp' de
sanktaj kvinvundoj, ;
sangantaj eĉ nun por la
homar'. ; Okuloj kun blu' de
maraj profundoj ; prilarmis la
sorton de l' idar':

,&2:

'3 "Mi venis instrui vin pri la
Amo, ; pri leĝ' de ĉiel' por
homa kor', ; kuraci la vundojn
per la balzamo ; de patra
kompat' por dia glori'.

'4 Mi venis por savi vin de l'
infero ; donante sur kruc' min
mem al mort', ; sed vane
forgutis sang' de l' ofero, ; ĉar
vorto de mi restis nur vort'.

,&3:

'5 Tomaso ja estis hom' pli prudenta ; kredante post tuŝ' kaj propra vid', ; Judaso ja estis hom' pli pripenta ; plorante pro krimo de l' perfid'

'6 ol Vi, vin nomanta mondo kristana, ; uzanta la krucon de l' dolor' ; por nova Golgot', krucumo profana ; de miaj doktrin' kaj rememor'!

,&4:

'7 Vi ĵetas inferon, gloro milita, ; animojn de l' fil' kaj homa frat'. ; Sed ve al semant'! Malamo ĵetita ; nur fruktos revenĝon sen kompat'.

'8 Pripentu homar'! Revenu al vojo, ; montrita de mi por la anim'. ; Al tera ĉiel' de Vero en ĝojo ; al Bono kaj Am' ĝi gvidos vin!"

,&5:

'9 Sur sangsaturita kamp' de batalo ; mutiĝis la veo de lasta ĝem', ; kaj sonis nur grak' de korvoj en valo: ; la kanto de funebra rekviem'.

'10 Ho, Kristo, mi sentas, se Vi revenus ; por vivi sur ter', instrui nin, ; la reĝoj, pastrar' denove kunvenus ; kun pruda humil' - krucumi Vin... ..)

& Ne la amo:

< Ripete 22 sed rekante 14 el 43 batoj por strofo, entute 430 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis (kaj komponis) Grigorij Arosev. Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de Mikis Theodorakis kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/dodo SoSo LaTi dodo; TiLa SoFa MiRe Do o; dodo SoSo dore mimi; (fa re mi do relfa milre do)×2 o

(#Rekantaĵe:; mimi mimi mimi mimi; misofami famiredo re; rere rere rere rere; refamire miredoTi do o)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Ne la amo sed la febro, ;
Trankviliĝo sed ne ŝtorm', ;
Ne animo sed algebro, ('; Ne
pasi' sed nu2ra2 form'.) (: Ne
pasi' sed nu2ra2 form'.)

(×: **Tamen paŝu, triston kaŝu**
; Venu kun ni danci en la
ĉen' ; **Viva nervo, vera vervo**
; Vagle paŝu en la danco
jen!)

'2 Ne la kuno sed la solo, ; Ne
kontakt' sed miskompren'. ;
Kaj anstataŭ viva bolo ; Marĉo
kaj droniga splen'.

'3 La kandelo jam forbrulis, ;
Tuta viv' vaksiĝis jam, ; Kaj la
vivo respegulis: ; Estas febro
sed ne am'.

'4 Apud vi mi estas fremda, ;
Kaj penetras min malpur', ;
Mankas fortoj por atendo ; De
alveno de plezur'.

'5 Ankaŭ mi ne havas fortojn ;
Por plu firmu mia brak'. ; Kaj
anstataŭ manĝi tortojn - ; Suĉi
akvon el kloak'.

'6 La kandelo jam delonge ;
Sin ekstermis pro ĉagren', ;

Kaj anoncis vento gonge ; Ke
ne estas kun', sed sen'.

'7 Certe vi ne vi jam estas, ;
Ankaŭ mi ne estas mi. ; Nia
amo ĉerke keŝtas, ; Anstataŭas
ĝin kemi'.

'8 Ne plu estas mi naiva. ; Pro
foresto de la halt' ; Nekredeble
tedis vivo - ; Ĝi similas al
asfalt'.

'9 La kandelo ploras gute ;
Kun neniuj perspektiv'. ; Kaj
forfluas pominute ; Tra la
fingroj nia viv'.

'10 Ne la amo sed la febro, ;
Trankviliĝo sed ne ŝtorm', ;
Ne animo sed algebro, ; Ne
pasi' sed nura form'.

& Demonoj:

< Ripete 17 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Aleksandr Puŝkin. El rusa tradukis Mikaelo Bronŝtein. Baladigis Martin Strid (2015) per modifita popolmelodio sveda "Leksmarschen" kaj nova rekantaĵo. Klarigo (*): '3 Jamŝĉiko: Rusa '5 Stalono: ĉevaluĉo. '6 Versto: rusa mezuro, 1067 metroj.>

(#Melodio:

<:31> (

/LATILASI LATI Do Doo;MiRe TISO TIRe LA; MiFiMiRe
MiFi So Soo;TiLa FiRe FiLa Mi ii;DoRe MiLa LaTiLaSo LaSo ;
Mi3Fi SoMi FiRe Mi Mi;LA Re3Fi LaSo Fi Mi;Re DiLA TISO
LA LA

)×14)+

(& Strofoj:

'1 /Nuboj flugas, nuboj volvas;
en fantoma luna hel' ; hasta
neĝo fluge polvas. ; Morna
nokto, morna stel'.

(×: **kaj ni flugas tra la nokto
nigra ; per magia ĉi rakonto,
; do dancu ĉiam vigla ; trans
jen fabela ponto.**)

'2 Kampo, kampo malsarena, ;
nur tintilo: din-din-din. ;
Volnevole vast' ebena ;
trompas min, timigas min.

'3 - Ek, jamŝĉik'!*! - Ho ne,
sinjoro! ; Por ĉevaloj peza
tren', ; la okulojn gluas
ŝtormo, ; mankas vojo sur
eben'.

'4 Ve! Eĉ spuron mi ne vidas!
; kion faru ni en sol'? ; Kampe
diablo nin misgvidas, ; rulas
nin laŭ sia vol'.

'5 Vidu, jen, jen ĝi ribelas, ;
prancas kun ĉevala hen', ; jen
stalnon* nian pelas ;
sovaĝintan al raven'.

'6 Jen ĝi misan verston*
montris ; antaŭ mi en neĝa
fum' ; jen fajrere ĝi
ekmontris ; kaj degelis en
mallum'.

'7 Nuboj flugas, nuboj volvas;
en fantoma luna hel' ; hasta
neĝo fluge polvas. ; Morna
nokto, morna stel'.

'8 Ĉesis tinto, sledo haltis, - ;
ni senfortas vagi plu... ; -
Vidu, kiu kampen saltis? ; -
Dio scias! Ŝtipo... lup'...

'9 Vent' malicas, vento muĝas,
; la ĉevaloj en stertor'; - jen ĝi
ien salte fuĝas, ; okulumas nin
en for'.

'10 Kaj denove rajd' senbrida;
La tintilo: din-din-din... ;
Amasiĝas gent' spirita ; en
ebena blanka sin'.

'11 Sen mezuro, ekster klaro ;
sub malhela morna lun' ; flirte
ŝajnas demonaro ; foliaron en
aŭtun'.

'12 Kien ili! Kion kantas ; en
sopir'? Laŭ kies vol'? ; Ĉu al
sorĉa nupto hantas, ; aŭ al
tombo de kobold'?

'13 Nuboj flugas, nuboj
volvas; en fantoma luna hel' ;
hasta neĝo fluge polvas. ;
Morna nokto, morna stel'.

'14 La fantomoj are, are ; en
senlimo flugas for. ; Per
plorego pende, knare ; ŝiras
vundon en la kor'.

& La drinkej' de Lama Lotte:

< Ripete 22 sed rekante 5 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #5107. Komponis William Steffe (ĉ. 1856). Sveda teksto el Gotenburgo (ĉ. 1860-1880). El sveda tradukis nekonato strofojn '1,2,3,5,6 kaj 10 kaj Martin Strid (2007) la ceterajn.>

(#Melodio:

<:31> (/So oFa MiSo dore mi i do o; La aTi doTi doLa So o Mi i; So oFa MiSo dore mi i do;

(#Rekantaĵe: dodo re re do Ti doododo dodo do)

)×14)+

(&Strofoj:

'1: (/Fratoj, ĉu vi akompanos ;)
;)×3 al

(×: **drinkej' de Lama Lotte en Gotenburg'**.)

'2 (Jes, ni volas akompani ;)
;)×3 al

'3,15 (Dek oerojn kostas brando ;)
;)×3 en

'4 (Ni neniom havas monon ;)
;)×3 en

'5 (Per kio nun ni devas pagi ;)
;)×3 en

'6 (Per kisoj, jes ni volas pagi ;)
;)×3 en

'7 (Kiu kisojn ĉi ricevu ;)
;)×3 en

'8 (Lama Lotte havas franjon ;)
;)×3 en

'9 (Ŝi ja kisojn ĉi ricevos ;)
;)×3 en

'10 (Nun la Lama Lotte mortis ;)
;)×3 en

'11 (Lama Lotte entombiĝis ;)
;)×3 en (×: **Tombejo Norda, jes, en Gotenburg'**.)

'12 (Hundoj pisas sur la tombo ;)
;)×3 en

'13 (Vermoj rampas la kadavron ;)
;)×3 en

'14 (Nun transprenis jam la ŝtato ;)
;)×3 pri **drinkej' de Lama Lotte en Gotenburg'**.)

& La milito de Pjero:

< Rekante 0 el 16 aŭ 15 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 5 minutoj per melodio #Nova. Verkis kaj komponis Fabricjo Deandre. El itala tradukis Renato Korseti. Baladigis (2015) Martin Strid per novaj strofdisigo kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(#Nova: <:31> miifami reeTido reemire do3La; LaaTido reerere reedore miimi;mi miifami reeTido miimire dooLa;La Tiidore fa3mi reedoTi LaaLa;

(#Rekantaĵe: LaTido re3re redoTi La3La; miimimi fa3fa famire dodo; dododo re3re redoTi La3La; Ti3Ti do o))×14

?

(#Origina: < 224 batoj, 3 minutoj.> <:16> 14×

'1,3,4,6,7,9,10,11,13,14 miifami reeTido remire dooLa;La LaTildo rerere redore miimi;mi miifami reeTido miimire dooLa;La Tiidore faafalmi reedoTi LaaLa;;

'2,5,8,12 LaTido re3re redoTi La3La; miimimi fafafa famire dodo; dododo reere redoTi LaaLa)

)+

(&Strofoj:

'1 Dormu trankvile en kampa la tombo ; ne estas rozo por doni la ombron ; por doni la ombron al via terkavo ; jen estas nur ruĝa, granda papavo

'2 Apud la bordoj de mia rivero ; mi volas vidi nur fiŝan laŭnaĝon, ; ne plu kadavrojn en tre juna aĝo ; kiujn forpuŝas la flu' al infero.

(×: **Ne kredu ĉion, kion vi aŭdas. ; Ne juĝu ĉion, kion vi vidas. ; Ne diru ĉion kion vi scias, ; Paŝu plu.**)

'3 Tion vi diris dum lasta somero: ; Nun kun aliaj en kota la tero ; vi trejnadas malĝoje pro endo ; kaj neĝon kraĉas al vi frosta vento.

'4 Haltu vi Pjero, haltu momenton ; kaj vin surblovi permesu la venton. ; Ĝi flustru la leĝon de ĉiu batalo: ; se donas vi vivon, jen estas medalo.

'5 Sed vi ne aŭskultis, pasadis la tagoj ; kaj la sezonoj kaj multaj fiagoj, ; kaj vi forfuĝis armean la flagon. ; Estis printempo kaj tre bela tago.

'6 Dum vi kunportis animon tornistre ; vi vidis homon, ja kvazaŭ prodistre. ; Li havis saman pripenson en koro ; sed de la vesto malsaman koloron.

'7 Pafu lin Pjero! Pafu lin lerte! ; Kaj por finmurdo pafu lin certe! ; Ĝis lia falo rapida al grundo, ; ĝis lia morto, la morto de hundo.

'8 Kaj se vi celos ja rekte la koron ; li havos tempon nur por la foriro, ; sed al vi tempo ne mankos por miro, ; miro pri homo kaj lia doloro.

'9 Dum havas vi tian senton anime, ; li tuj turniĝas, vin vidas, ektime ; abrupte fajras la armilaro ; malgraŭ de vi kompleza la faro.

'10 Vi falis al tero sen veo, sen krio, ; kaj ekrimarkis vi kun emocio ; ke via vivo jam longas neniom, ; ke ne plu estos reven' eĉ por iom.

'11 Vi falis al tero sen veo, sen krio, ; kaj ekrimarkis vi kun emocio ; ke tiu estos la lasta vivsceno, ; por vi neniel ja estos reveno.

'12 Ninjeto mia, pro morto en majo ; min kaptas multa, eĉ troa, malgajo. ; Ninjeto, mi al la nigra infero ; preferus iri dum vintra vetero.

'13 Kaj dum vin gapis de l' sulkoj la greno ; pafilon tenis vi per forta teno, ; vortojn vi tenis ja firme en buŝo ; kiuj ne likvos pro suna la tuŝo.

'14 Dormu trankvile en kampa la tombo: ; ne estas rozo por doni la ombron, ; por doni la ombron al via terkavo ; jen estas nur ruĝa, granda papavo.)

& La perfidita junco:

< Rekante 17 el 31 aŭ 15 el 29 batoj por strofo, entute 434 aŭ 406 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkis William Auld. Baladigis Martin Strid (2015) komponub nova melodio, alternative donanta melodion kaj rekantaĵon sudinsulajn de Jalgrujma balado.>

(#Melodioj:

(

(#Nova: <:31> /mi dore mi so mimi rere mimi; fa fafa mi re (rere dore)?(soso sofa) mimi

(#Rekantaĵe: mi dore mi so mimi rere mi mi; fa fafa fa mi rere doTi La La a))

?

(#Sudinsula: <:29> /La Tido TiLa La3lMi LaLa Tido TiLa; dolre mi3mi falmi mi redo mimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a))

)×14)+

(&Strofoj:

'1 (#Nova:

/Jam unu fojon ni al fremdaj
bordoĵ ; iris batale kontraŭ
faŝisthordoĵ.

(×: **Ni, junaj, ne toleru plu la
honton, ; ke oni al ni rabas
la estonton!**))

?

(#Sudinsula:

/Jam unu fo2jo2n ni al fremdaj
bordoĵ ; i2ris bata2le kontraŭ
faŝisthordoĵ.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme
; nun tretu fiere ĉiuj en la
ĉen' ; staras jen mastrino.**))

'2 Pro mia kredo mi buĉadi
lernis, ; kaj multajn homajn
vivojn mi ekstermis.

'3 Aŭ mi supozas tion: mi ne
vidis. ; En alto mi aeroplanon
gvidis,

'4 kiu bombegojn portis en la
ventro, ; kaj vomis morton al
la urbocentro.

'5 Poste ekfloris lantaj
fulmofungoj. ; Milito kvazaŭ
per gigantaj ungoj

'6 la grundon gratis kaj la
mondon tordis. ; Kaj tiel
homofratoj ĉie mortis.

'7 Ni, la junuloj, iris en inferon
; por tranĉi el la monda mam'
kanceron.

'8 Ni kredis je pli forta posta
sano, ; pli pura vivo laŭ
pacama plano.

'9 Oni al ni promesis la
futuron, ; se ni likvidos la
faŝistteruron.

'10 Mensogo fia! Kion ni
ricevis, ; kiam la falsa
bestregimo krevis?

'11 Ĉu pacon kaj esperon kaj
progreson? ; Ĉu oni ja
plenumis la promeson?

'12 Ne! Aŭdis ni, veninte el
batalo: ; La mondon savis vi
por kapitalo!

'13 Oni al ni proponis la
premiojn: ; malnovajn kredojn
kaj malnovajn diojn.

'14 Ni, junaj, ne toleru plu la
honton, ; ke oni al ni rabas la
estonton!)

& La soldato kiu marŝas:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 4 minutoj. Poemon verkis Claude Piron. Baladigis Martin Strid per tradicia marŝo dalekarla kun nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (/DoDo DoLA DoDo DoDo; TIDo TILA ; TITI TITI;
DoDo DoLA DoDo DoDo; TIDo TILA TITI TITI;

(#Rekantaĵe: Do Re Mi Mi Re MiFa Mi; La Tire do TiLa Si i La
a;)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /La soldato kiu marŝas ; en
la vento ; en silento ; sur la
vojo kiu marĉas ; sian korpon
ne plu sentas.

(×: **Marŝu fale plu al batal' ;
Trivas la vivo soldata.**)

'2 Lia menso fakte brutas ; nur
la laco ; kaj l' agaco ; de la
pluvo kiu gutas ; senkompatate
lin turmentas.

'3 Kaj li iras plu malbone ; pri
la koto ; sur la boto ; kiu ĉiam
pezas ĝene ; kaj la vojon
malglatigas.

'4 Dum sufero monopole ; la
kadenco ; en la menso ; regas
ĉion malbonvole ; kaj la
povon pensi ligas.

'5 Kaj li marŝas en la vico ;
uniforma ; unuforma ; sur
vetera la malico ; kaj la moko
de la serĝent'.

'6 Li delonge jam maldormas ;
kaj oscedo ; kun obsedo ; en
makzelo mem sin formas ; pro
nerezistebla tent'.

'7 Se li povus eĉ almoze ;
ekricevi ; rajton revii ; kaj
minuton nur ripoze ; halti sur
la voja bord'.

'8 Sed li tion ne esperas ; ĉar
la revo ; pro la devo ; en
soldato ne aperas ; jen la
militserva sort'.

'9 Jam tro pezas la pafilo ; kaj
la kasko ; kaj la sako ; kaj la
kaĉo el argilo ; gluiĝinta ĉe la
ŝu'.

'10 Sed la fora horizonto ; plej
perfide ; malrapide ; maleblige
al renkonto ; ĉiam foren fuĝas
plu.

'11 La soldato kiu laca ; daŭre
iras ; li sopiras ; al ripoza vivo
paca ; sen ĉiama plua pel'.

'12 Sed li sentas kun eknaŭzo ;
ke la vivo ; en aktivo ; daŭras
ade kaj sen paŭzo ; ĝis
neatingebla cel'.

'13 Kaj samkiel en armeo ; la
rezono ; pri ordono ; ne
ekzistas pro obeo ; kun neblo
de escept'.

'14 Tiel mankas la kompreno ;
pri la motivo ; de la vivo ; kaj
nur regas ĉi sinteno: ; plua iro
kaj akcept'.)

& Al la fratoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 435 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (La esperantisto n-ro 7, 1890). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj tradukita rekantaĵo de Balado de Virgar.>

(#Melodio:

(# Virgars Kvæði: /MiiLaLa LaTi TiiTiTi doore;re redo dooTiTi TiiMi;Mi LaLa TiTi TiiTiTi doore;re redo dooTiTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La a)

)×15)+

(&Strofoj:

'1 /Forte ni staru, fratoj
amataj, ; Por nia sankta afero!
; Ni bataladu kune tenataj ;
Per unu bela espero!

(×: **Nun emas mi en danco
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;
kreskadas tre.**)

'2 Regas ancorau nokto sen
luno, La mondo dormas
obstine, ; Sed jam levighos
baldaŭ la suno, ; Por lumi,
brili senfine.

'3 Veku, ho veku, veku
konstante, ; Ne timu ridon,
insulton! ; Voku, ho voku,
ripetadante, ; Ghis vi atingos
auskulton!

'4 Dekon da fojoj vane
perdighos ; La voko via ridata,
- ; La dekonua alradikighos, ;
Kaj kreskos frukto benata.

'5 Tre malproksime chiuj ni
staras ; La unuj de la aliaj... ;
Kie vi estas, kion vi faras, ;
Ho, karaj fratoj vi miaj?

'6 Vi en la urbo, en la urbeto, ;
En la malgranda vilagho, ;
Chu ne forflugis kiel bloveto ;
La tuta via kuragho?

'7 Chu vi sukcese en via loko ;
Kondukas nian aferon, ; Au
eksilentis jam via voko, ; Vi
lacaj perdis esperon?

'8 Iras senhalte via laboro ;
Honeste kaj esperante? ;
Brulas la flamo en via koro ;
Neniam malfortighante?

'9 Forte ni staru, brave laboru,
; Kuraghe, ho nia rondo! ; Nia
afero kresku kaj floru ; Per ni
en la tuta mondo!

'10 Ni ghin kondukos ne
ripozante, ; Kaj nin lacigos
nenio; Ni ghin traportos
sankte jhurante ; Tra l' tuta
mondo de Dio!

'11 Malfacileco, malrapideco ;
Al ni la vojon ne baros. ; Sen
malhonora malkuragheco ; Ni
kion povos, ni faros.

'12 Staras ankoraŭ en la
komenco ; La celo en
malproksimo, - ; Ni ghin
atingos per la potenco ; De nia
forta animo!

'13 Ni ghin atingos per la
potenco ; De nia sankta
fervoro, ; Ni ghin atingos per
pacienco ; Kaj per sentima
laboro.

'14 Glora la celo, sankta l'
afero, ; La venko - baldau ghi
venos; Levos la kapon ni kun
fiero, ; La mondo ghoje nin
benos.

'15 Tiam atendas nin
rekompenco ; La plej majesta
kaj richa: ; Nia laboro kaj
pacienco ; La mondon faros
felicha!

& Majkanto la malnova:

< Rekante 10 el 19 batoj por strofo, entute 437 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #2263. El sveda tradukis Kukoleto (1993) tradician parton. Aldonis (2015) movadan parton Martin Strid kaj primigis takton de melodio per forigi unu antaŭlastan takteron [i]. Jen do modifita unu el multaj variantoj de popola melodio. Klarigoj (*): '5 Alaŭdoj, kiel multaj aliaj birdoj, post vintra foresto revenas printempe. Ĝia kanto do indikas venantan someron. '10 Lumo: Oni faras kandelojn el la abela vakso. '11 Meti = demeti ovojn. '14 Se neniu elvenas, oni insultas la domanojn.>

(#Melodio:

<1,1:19> (a;Mi /LaSi LaTi doTi La; Si TiSi Mi Fi;Si TiLa LaSo MiiMiRe Do; ReRe MiMi SiLa Tido Ti La)×23)+

(&Strofoj:

'&Tradicia:

'1 Ves/peron bonan en bien'! ;
Majo bonvenas! ; Pardonu se
ni vekas vin ; ((Dolčas la
somero por junuloj.) <aŭ>
(Ĝoju ni pri dolĉa la somero.))
'2 Nun venas ni al via bien'
(×;: **Majo bonvenas!** ;)
do ĉu ni rajtas kanti jen?
(×;: (**Dolčas la somero por
junuloj.**) ? (**Ĝoju ni pri dolĉa
la somero.**))

'3 Ni portas Majon en vilaĝ'
..... kaj laŭdas ĝin per
kantoomaĝ'

'4 Ĉar estas for la vintra mond'
..... Nun verdas herboj kaj
arbfond'

'5 La dolĉa alaŭdeta ton'*
leviĝas kun Majkanta son'

'6 Bonvena estu Majmonat'
..... somero ĉi al Dia ŝat'

'7 Nin donu jaron da prosper'
..... kaj gardu pri bieno kaj ter'
.....

'8 Sur stangoj pendu fortlupol'
..... Maldolĉabsinton semu en
val'

'9 Butero, lakto kaj fromaĝ'
..... kaj fagopiro por gria kaĉ'
.....

'10 Abela don' da vaks', miel'
..... por sano, manĝo, lum'* kaj
bier'

'11 Kokino metu* sur la plad'
..... por krespoj kaj por
ovomanĝaj'

'12 Folias ni tegmenton ĉi
Morgaŭan tagon vidos vi

'13 Bonnokton, dankon kaj al
pac' ĉar iom bonis la
donac'

'14 Kaj kuŝu, kuŝu, pigra
bov'*, ĝis puloj, pedikoj
vin trenos al mov'

'&Movada:

'15 Kongresos ni en la somer'
..... en la lingvo de la esper'
.....

'16 Ni donos kursojn kun bona
etos' jen estas nia sulka
fos'

'17 Babilos ni en gaja band'
..... kun homoj el alia land'

'18 Per poezi' kaj literatur'
la lingvo vivas kaj per humur'
.....

'19 Per gajaj kantoj kaj muzik'
..... la lingvon uzos ni en
praktik'

'20 Kaj paŝos ni en ĉena danc'
..... kun ruso, ĉino, polo kaj
franc'

'21 Kaj paŝos ni en danca ĉen'
..... kun anglo, perso kaj
sloven'

'22 Ĉendancos ĝue, man' en
man' kun brazilano kaj
german'

'23 Ĉendancos ni en gaja ar'
..... kun hindo, japano kaj
hungar'

& Alvoko:

< Rekante 20 el 37 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versaĵaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por "La simbolo de l' amo" kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (a;Mi /La SiSi La Ti;Ti do TiTi do re;re mi mifa mi do;La La TiLa Si Mi

(#Rekantaĵe: i;Mi La SiSi La Ti;Ti do Ti do mi;mi so mimi redo TiSo La doTi La So Mi dolTi La))×12)+

(&Strofoj:

'1 Ka/ruloj sentemaj, ; aŭskultu la diron: ; De Rusa la Gento ; vi aŭdu sopiron

(×:; **Nun paŝu atente ; per manoj sente ; la takton kaj pakton de balada la danca ĉeno2 jen.**)

'2 Infano malsata ; ploregas angore; amanta patrino ; suferas dolore.

'3 Por kara la filo, ; ne havas ŝi nutron, ; ĉar brusto, la ŝia, ; nur havas jam putron.

'4 Terura momento! ; Ŝi vidas de l' filo ; la morton, baldaŭa ; sur lia pupilo.

'5 De l' knabo malgrasa, ; Ne tenas la mano ; tremema, senforta, ; peceton el pano.

'6 Junulo malforta ; en plankon, jen, kuŝas; la Morto tragika ; lin akre ektuŝas.

'7 Forrabis malsato, ; malsato kruela, ; la viajn vangrozojn... ; Knabino tre bela!

'8 De l' Volga Popolo ; la vivo aktuala ; martiro ja estas ; pro kaŭzo fatala.

'9 La gentoj ankoraŭ ; heroe rezistas. ; Ĉu en ni, Homaro, ; kompato ekzistas?

'10 Alkuru ni, ĉiuj, ; kun nia almozo, ; ĉar estas bonfaro ; plej bela la rozo.

'11 Homaro rapide ; praktiku fratamon, ; al Rusa la Gento ; ni portu balzamon;

'12 balzamon efikan, ; balzamon de l' vivo, ; por tion alporti ; jam estas motivo.)

& Feina sorto:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

a;do /dodo dore doTi La;So dodo dore mimi mimi; miifafa soso
somi mi;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa
somi mire do; do mire do dodo Ti La)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Fe/ino vivis en la lag' ;
Kun viv' soleca kaj kvieta ;
Kaj al la bord' je unu tag' ;
Alvenis juna vir' poeta.

(×: **Dancu soleca feino ;
Venu al junula sino ; Li
forlasos baldaŭ vin ; Dancu
soleca feino.**)

'2 Kaj bela estis la junul' ;
Kaj bukla lia brunhararo ;
Ardante brilis sorĉa brul' ;
En lia nigra okulparo.

'3 Ekvidis ŝin la juna vir' ;
Ekflamis lia kor' amema ;
Li kantis kanton pri l' sopir' ;
Kaj vokis ŝin per voĉo trema.

.....

'4 Solecon frostan de l' fein' ;
Neniam tuŝis voĉo tia, ;
Ensorĉis por eterne ŝin ; La
okulparo flamradia.

'5 Kaj plenumiĝis ŝia sort' ;
Tra l' koro boris amo-sago ;
Tirate de ravanta fort' ; Sen
vol' ŝi venis el la lago.

'6 Iliajn lipojn ama brul' ;
Kunfandis. Vane vokis ondo. ;
Ŝi, man' en mano kun junul' ;
Ekiris al mortema mondo.

'7 Kaj estis por eterne for' ;
Fedigno virgulina, sorĉa, ;
Ŝi donis ĝin plezure por ;
La ravo de la amo dolĉa.

'8 Kaj ne ekfloris plu narcis' ;
Se lipojn ŝi por rid' malfermis,
; Ne milda flor', sed fajra kis' ;
Sur ŝiaj ruĝaj lipoj ĝermis.

'9 Kaj se ekkaptis ŝin dolor', ;
L' okuloj plu ne perlojn rulis. ;
Sed vera, homa, sala plor', ;
Varmega larm' en ili brulis.

.....

'10 Kaj ĉiam pli kaj pli da
larm' ; Elgutis al ŝi el okulo, ;
Ĉar, ve, ekvelkis ŝia ĉarm', ;
Kaj ŝin forlasis la junulo.

'11 Feinoj, estas la destin' ;
Por vi kruela kaj malbrila. ; La
sort' elekti trudas vin, ;
Elekto estas malfacila:

'12 Fevion frostan vivi sur ;
La koro kun glacia krusto, ;
Aŭ en pasema amplezur' ;
Ekvelki sur la vira brusto.)

& Vagemulo:

< Ripete 56 sed rekante 38 el 74 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. El ĉeĥa (?) tradukis Vladimir Türk. >

(#Melodio:

<:2> (

/h hLADo /Re ReDoTI /DoDoo hDoRe /Mi MiMiRe /Mi hMiMi
/LaLaa aTido /TiSoo hLaTi /LaFaa hLaSi /La a)×

(#Rekantaĵe: /LaLaLa LaSoLa /TiTiLa So /SoSoSo SoSoFa /Mi h
/LaLaLa LaSoLa /TiTiLa So /LaLaLa LaSoLa /TiTiLa Ti /TiTiTi
Ti

/h hLADo /Mi MiReDo /ReRee hDoRe /Mi MiMiRe /Mi hmimi
/LaLaa aTido /TiSoo hLaTi /LaFaa ahh /La Si /La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 (/ Kiu /fajron gustu/madis, ;
kaj komp/renas, diru /nun, ;
kial /al mi oni /diras, ; oni
/diras Vage/mul')×

(×: /**Suno sabata ne /plu
vidos min ; /kun kamaradoj
ĉe /voj' ; /tendotuk' sub
tegment' /polve, ; hontas
/kaj forgesitas ; mal/novaj
kantoj, /miaj kantoj)**

(×: / **Kiu /forojn
gustu/madis, ; kaj
komp/renas, diru /nun, ; kial
/al mi oni /diras, ; oni /diras
/Vage/mul')**

'2 (La konatoj en salono ;
envianto post angul' ; via
kant' por tag' banala ; via kant'
de Vagemul')×

'3 (Iam nokte mi tristegas ;
hejme ofte grumblas nur ; jen
imposto por “Bis!” via ; kiun
pagas Vagemul')×

'4 (Ĉiu koncert' aliloke, ; vi pri
lito ĝojas nur ; estas bone,
kiam kantas, ; kvankam triste
Vagemul')×

'5 (Iam certe iu venos ; kaj
ekfajfos iru nun ; kamaradoj
premos manon ; do,
bonvenon, Vagemul'!)×
.....

'6 (Steloj brilos kiel tiam ;
ekdoloros en okul' ; dum la
nokt' al ili kantos ; frenezulo -
Vagemul')×

*Suno sabata ekbrilos por mi ;
ni staros kune ĉe voj' ;
senpolviginte la tendotukon ;
mi memoros malnovajn
kantojn)*

& Ekvilibro:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo. Klarigo (*): '14 Ke oni "tiklu la sorton en la faŭko" postulis iam la heroa muzikisto Beethoven, revoluciema ulo tute laŭ mia gusto. (Cezar).>

(#Melodio:

<:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o

)×14)+

(& Strofoj:

'1 /Pianisto /mem a2ktivas,
(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

/klavoj ŝajne /nur pa2sivas.

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**
; /**Iru plankon, dancu kun**
/**granda em'!**))

'2 Tial estas klava sorto sin
submeti al la forto.

'3 Sed fieras tamen klavoj,
sed ne kiel kvazaŭ-pavoj.

'4 Ĉar sen klavoj kaj piano
eĉ ne ludus majstra mano.

'5 Ekvilibro do ekestas kaj
la tuta mond' ĉeestas,

'6 se la ĝoj', la di-fajrero,
jam ekdancas do sur Tero.

'7 Spite al la maljusteco
ĉio estas, ĉiu, peco
.....

'8 de la kosmo kaj de Ter'.
Hom', fieru, sed kun deco!
.....

'9 Estu batalant' ĝislaste.
Ne subiĝu kaj eĉ haste.
.....

'10 Klavo iĝis – pro rezisto –
..... la partner' de l' pianisto.
.....

'11 Ĝoju homo, ke vi vivas,
..... ke vi sanas kaj kreivas,
.....

'12 ĉagreniĝu ne pri riĉo,
tio estus superstiĉo.
.....

'13 Hom' ne povas manĝi
monon, tial pluan do
admonon:
.....

•
'14 Amu, kreu, ĝis la morto,
..... tiklu en la faŭk' de l'
sorto*.)

& Svato de monta ogrino:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj. El sveda tradukis Martin Strid (2016). Klarigoj (*): '1 Sunbrilon oĝroj ne toleras. '2 Iranto: Ĉevalo.>

(#Melodio:

<1,6:4> (mi /milfa milre redo doLa /dolre doTi La; LaTi /do dodo re dolre /mi do h h; /mifa mire redo doLa /dore doTi La La;Ti /do do rere dore /mi do oh;

(#Rekantaĵe: mi /milfa milre redo doLa /dolre doTi La; LaTi /do do re dolre /mi so oh; mi /milfa mire redo doLa /dolre doTi La a;LaTi /dore doTi La ah)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ma/te²no²n frue antaŭ /a²ŭrora sun'*, ; pre ol /ekis la birdo²j /kanti ; /montogrino svatis sin al /bela fraŭlo juna, ; kaj /falsa estis ŝia /lango.

(×: **Sin/jo²ro² Mane-lig, fi/a²nĉu al mi ; ĉar o/fertas mi vo²/lonte. ; Vi /po²vas respondi nu²r /je²s a²ŭ ne, ; ĉu vi /volas a²ŭ ne.)**

'2 Donos mi al vi la irantojn* dek du ; kiuj iras en roza arbareto. ; Estis neniam selo sur ili, ; nek brido en buŝa meto.

'3 Donos mi al vi muelejojn dek du ; kiuj staras de Tiloj al Tarnoj. ; Ŝtonoj estas el plej pura or' ; kaj radoj arĝente en garno.

'4 Donos mi al vi la glavon el or' ; kiu tintas per dek oraj ringoj. ; Vi batalu kiel volas via vol', ; bataleje vi venkon atingos.

'5 Donos mi al vi novan ĉemizon jen, ; vi plej bonan trivi meritas. ; Estas ne kudrita per pinglo aŭ faden' ; sed el blanka silko trikita.

'6 Tiajn donacojn akceptus mi
ja ; se vi estus virino kristana.
; Sed nun vi estas plej fia
monta ogr' ; el diablo kaj
nikso (profana)?(la klano).

.....

'7 Kuris eksteren tra pordo
montogrin' ; ŝi skuiĝas kaj
tremas histere. ; Se mi ricevus
belan junan lin, ; mi seniĝus je
mia sufero.)